# *Je 65 jaroj de venkoj kaj transformoj*



**Foto: Granma**

Havano, jan 9 (RHK) Kiel tiu 8-an de januaro 1959, la venka Karavano de Libereco reeniris Havanon, anoncante novan etapon de profundaj ekonomiaj kaj sociaj transformoj en la lando.

Tiam, la ?efkomandanto de la Kuba Revolucio, Fidel Castro Ruz, haltis multloke por interparoli kun la homoj, kiuj vigle akceptis lin, ?ar, kiel hodia?, estis multo por diri kaj klarigi.

"Ni trovis en unueco, kolektiva direkto kaj amo al la Patrujo la fundamentajn rimedojn por alveni ?i tien, enga?itaj por doni solvojn al la problemoj, kiuj plej afliktas la popolon", diris Luis Antonio Torres Iríbar, unua sekretario de la Provinca Komitato de la Partio en la ?efurbo, en la aran?o por la 65-a datreveno de la eniro de la Karavano, ?i-lunde.

En la Lerneja Urbo Libertad, kaj en ?eesto de Miguel Díaz-Canel Bermúdez, Unua Sekretario de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidento de la Respubliko, Torres Iríbar esprimis, ke ni vivas en escepta momento, koncentrita al evoluigo de la ekonomio, de?enigi la produktivajn fortojn kaj praktiki novajn formulojn, kiuj, ligitaj al niaj principoj, anta?enigas la necesan prosperon.

Fronte al ?i tiu scenaro, li diris, ke ni devas plifortigi la preparon por alfronti ?in, plifortigante valorojn, plenumante ?iun taskon, parolante klare, ?ustatempe kaj honeste al la popolo.

Brigada generalo Delsa Esther Puebla Viltres, nome de tiuj, kiuj anta? 65 jaroj veturis pli ol mil kilometrojn en la liberecana karavano, reasertis, ke ni kubanoj devas konservi nian nerompeblan unuecon kaj fidon al venko.

Fonto: Granma

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/343998-je-65-jaroj-de-venkoj-kaj-transformoj

**Radio Habana Cuba**